

Kunvoko al la Jarkunsido

La 18an de majo 2014 en kastelo Greziljono je la 10a 00.

La Jarkunsido estas kunvokita dimanĉon la 18an de majo 2014.

La societanoj estas invititaj en la kastelo ekde sabato, ĝis lundo : bonvolu aliĝi en la retejo, por ke ni povu plani la manĝojn kaj la loĝlokojn.

La societanoj, kiuj ne povos ĉeesti, bonvolu sendi sian rajtigilon plenigitan per la nomo de societano ĉeestonta la jarkunsidon, kontaktinte tiun ĉi tiel, ke ili obeu la novan statutan regulon limigantan la nombron de rajtigiloj je 5 por ĉiu persono (vi povas konsulti la liston de la societanoj, kiuj anoncis ke ili ĉeestos, en la retejo « gresillon.org », paĝo Jarkunveno : <http://gresillon.org/ag>; NB : en la kazo de rajtigilo sen nomo, tiu ĉi ne povos esti uzata dum la voĉdonoj sed estos enkalkulita por la kvorumo je 1/6 de la societanoj – tio estas 50 – necesa, por ke la Jarkunsido povu valide labori).

Tagordo

- 1) elekto de la prezidanto kaj sekretario de la kunsido
- 2) nombrado de la ĉeestantoj kaj de la rajtigiloj
- 3) evoluo de la nombro da societanoj, kontrolo de la kvorumo
- 4) agadraporto 2013, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido)
- 5) financa raporto 2013, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido)
- 6) aprobo de la kontoj por la jaro 2013 kaj uzmaniero de la profito,
- 7) buĝeto 2014
- 8) kvitigo de la Administra Komitato
- 9) rezulto de la elekto de Administraj Komitatoj
- 7) propono de cerbumado pri la evoluo de nia Civila Societo : evoluo ĉu al transformo en Anoniman Societon aŭ Simple Akcian Societon, ĉu al alia organizo kun kreado de kroma societo aŭ asocio.
- 8) diversajtoj

Evoluo de la nombro da societanoj

La 31an de decembro 2013, kalkulinte kun forpasoj, donaco de societaj partoj, perdo de societanecon se oni ne donas vivsignon dum tri jaroj, restis 301 societanoj kun 1023 societaj partoj entute. 141 societanoj, kiuj, pro artikolo 6 de la nova statuto, perdis sian societanecon ĉar ili ne manifestiĝis de minimume tri jaroj, ricevis leteron por informi ilin pri tio ĉi. Ili povos reakiri societanecon per simpla peto. El la 272 societaj partoj, 49 estas donitaj al la Kulturdomo kaj ilia valoro aperas en konto 70820 « Donacoj de societaj partoj », la aliaj estas registritaj en konto 4672 « konto eks-societanoj », kiu utilos por repagi la societajn partojn de tiuj, kiuj petos tion. 170 societanoj konsentas ricevi la kunvokilon al jarkunsido per retmesaĝo.

Agadraporto 2013

Staĝoj, ludonoj, konstrulaboroj ebligis okupi la kastelon 41% de la jaro (56 tagoj de staĝoj, 46 de ludonoj, 39 de konstrulaboroj, ne kalkulante la konstruadon de la ŝtuparo dum ni forestis, kaj 7 tagoj de Komitatkunsidoj kaj Jarkunsido). Dank' al ludonoj, la jaro estas finance profita.

Staĝoj

Ni daŭrigis niajn tradiciajn staĝojn krom la jarŝanĝa festo 2013/2014, kiun oni nuligis.

Printempas kunvenigis 48 ĉeestantojn inter la 19a kaj la 29a de aprilo, el kiuj 35 pagantoj, por entute 856 manĝoj kaj 290 tranoktadoj. 22 trapasis la ekzamenon (22 en 2012), el kiuj 4 venis speciale por la ekzameno (6 en 2012). La ekzamenantaro konsistis el Zsofia Korody kaj François Lo Jacomo. La kursojn gvidis Stefan MacGill, Christophe Chazarein kaj Ŝtonĉjo (Pierre Soubourou). Jannick Huet estis staĝestro kaj Sunjo Cash kaj Ronan Le Corre zorgis pri mastrumado kaj kuirado.

La kvin semajnoj de staĝoj estis tre neegalaj. Kvar el ili akceptis po malpli ol dudek staĝanoj :

- turisma semajno (6 – 13 julio) 15 staĝanoj (22 en 2012)
- artamatora semajno (13 – 20 julio) 15 staĝanoj (14 en 2012)
- alternativa semajno (20 – 27 julio) 15 staĝanoj (25 en 2012)
- teatra semajno (10 – 17 aŭgusto) 19 staĝanoj (29 en 2012)

Kompense, la semajno S4 « festa por infanoj,adoleskantoj, junuloj, familioj... », kiu, de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto, plilongigis la Renkontiĝon de Esperanto-Familioj REF, akceptis 71 personojn el kiuj 31 infanojn. La staĝestroj estis : Sunjo Cash, Jannick Huet, Jean-Luc Kristos, François Lo Jacomo kaj Bert Schumann, kaj la gvidantoj : Gabriele Aquilina, Rolande Cleizergues, Nicky Janssen, Nina Korjenevskaja, Catherine Kremer, Jean-Luc Kristos, Perla Mielo, Michèle Viau. Mastrumadon kaj kuiradon prizorgis Sunjo Cash kaj Ronan Le Corre.

Dum la semajno de Aŭtune (25 oktobro – 1 novembro), ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj, estrita de Bert Schumann kaj gvidata de Serge Sire, Ansofi Markov, Valère Doumont (skoltoj), Elisabeth Barbay, Nicolas Viel kaj Christian Rivière (kuiradon prizorgis Anne-Marie Ferrier kaj Nicole Rizzoni), 57 homoj venis en la kastelon : la staĝanoj (27 pagantoj), la teatra trupo el Rennes La Funeluloj, kiu prezentis, sabaton vespere, la gangsteran sekreton, kaj ankaŭ dek membroj de la partio Eŭropo Demokratio Esperanto, kiuj okazigis parallèle sian post-someran universitaton.

Entute 53 tagoj de staĝo kun kastelo meze 50% okupata, tio estas 244 homoj por 4085 manĝoj kaj 1402 tranoktoj.

Ludonoj

Unuafoje la kastelo malfermiĝis al ekstera publiko. El la 15 ludonoj – du aliaj estis nuligitaj –, kiuj enspezigis preskaŭ 20 000 €, kelkaj estis por Esperantistoj, interalie REF, Renkontiĝo de Esperanto-Familioj, kiu, de la 27a de Julio ĝis la 3a de aŭgusto, akceptis 83 personojn el kiuj 43 infanojn.

Unu ludono kaŭzis kelkajn prizorgojn : la studentoj de Monda Helpe ISC, de la 4a ĝis la 6a de oktobro, venis 70-ope por festi, sonorigis plurfoje la alarmons... Kvin aliaj mendis la servojn de Ronan Le Corre kiel kuiristo.

Konstrulaboroj

Unue, ni daŭrigis la normigadon de la kastelo, anstataŭigante la pordojn de la ĉambroj per kontraŭfajraj pordoj kun pordo-fermiloj, instalante kontraŭfuman sistemon (elĵetilon) en la ĉefa ŝtuparo, gardstangojn konformajn al normo NF P 01-012 en ĉiuj ĉambroj.

Al tio aldoniĝas la konservado de la kastelo (pentrado ĉambroj 1 – 6, ...) kaj de la parko (heĝoj antaŭ la kromdomoj kaj la hejtejo, bambuoj apud la baseno, forcejoj en la legomĝardeno, ...). Ni replantis poplojn anstataŭ tiuj, kiujn ni vendis en 2011.

Sed la ĉefa konstrulaboro estis la konstruado de nova ŝtuparo, inter la 12a de novembro kaj la 12a de decembro. Claude Bensimon laboris pri tio de pli ol unu jaro, kunordige kun Francis Lasson kaj Yves Couturier. Tiu ĉi ekstera ŝtuparo, metala, helika, kondukas al la du etaĝoj estante konforma al la sekurecaj normoj. Ĝi ebligas remalfermi kelkajn ĉambrojn en la dua etaĝo. Komence de 2014, la malnova ŝtuparo inter la unua kaj la dua etaĝo estis forigita.

Fine, la 13an de novembro vizitis nin la Sekureca Komisiono, kiu, krom kelkaj detaloj (kanapoj en la enirhalo), nenion riproĉis. Ni daŭrigis nian kontakton koncerne la elektran subteran kablaron instalotan de ERDF sub nia enirpado, kaj pri la verda vojo, sed ni havas nenion novan por prezenti al la Jarkunveno krom la fakto, ke ambaŭ projektoj daŭre aktualas. Ni komencis la pristudon de la konekto de niaj tubaroj al urba kloako, kiun ni devos realigi kiel eble plej frue.

Ni danku Claude Bensimon, Francis Lasson, Yves Couturier, Bert Schumann & Jannick Huet, Frédéric Lauriol, Ŝtonĉjo & Libnjo, Gilles Picault, Jean-Jacques Moreau, Gilles Tirard, Robert, Paulette & Patrick Naulet, Pierre Grollemund, Michèle Viau, Anne-Marie Ferrier, Frédéric Dambreville, Ugo de Maubeuge, Jean-Luc Kristos, Geneviève Gourichon, Catherine Kremer, Zofia Loiseau, Michelle Lebreton, Michel, Ewen & Elodie Couson, Xavier Godivier... kiuj volontule partoprenis tiujn ĉi diversajn konstrulaborojn.

Komunikado

Krom nia retejo ĉiam ĝisdata dank' al Bert Schumann, la nova reklamilo realigita de Ŝtonĉjo, nin vizitis dufoje Agence France Presse, oficiala franca gazetara agentejo, unue ĵurnalisto kaj fotisto, poste ĵurnalisto kaj filmisto. El tio rezultis pluraj artikoloj kaj filmo « Esperanton ludante ». Ni aperis sur la unua paĝo de loka gazeto Courrier de l'Ouest mardon, la 13an de aŭgusto 2013.

Financa raporto 2013

La jaro 2013 finiĝis profita je +125€ laŭ librotena vidpunkto, sed post enigo en la jarajn elspezojn de pluraj fakturoj (nome 10 211 €) rilatajn al la ekstera ŝtuparo.

Inter la rimedoj, vi notu:

- ke la servopropono (enspezoj de niaj staĝoj) malkreskis. Ni akceptis malpli da staĝanoj en 2013 ol en 2012 (4 el la 5 someraj semajnoj estis seniluziigaj).
- ke la ludono de la kastelo enspezis 19 695 € (sen aldonvalora imposto), kaj nur 3 812 € en 2012. Tio ja kompensas la malkreskon de la enspezoj de propraj agadoj de la Kulturdomo.

Ĉar ni enkalkulis 15 000 € kiel esceptaj donacoj okaze de ĝisdatigo de la kapitalo en la vendosumo de 2012, ni finfine realigas kreskon de nia vendosumo kompare al 2012. N.B. La efektiva vendosumo 2012 estis 68 555 – 15 000 = 53 555 €, kaj en 2013: 64 574 €.

Inter la kostoj, vi notu:

- ke ni konsiderinde malpliigis la poŝtkostojn, ĉar fakte unue ni organizis unu solan Jarkunvenon (sen elekto) sed ankaŭ ni multe laboris por forigi ĉiun neutilan sendadon kaj ni daŭrigis tiun ĉi laboron por la nuna Jarkunveno.
- Ke ni malpliigis la imposton ĉar ni ne pagis loĝimposton. Dank' al nia laboro ĉe la impostejo, ni eĉ ricevis repagon (en 2014) de la loĝimposto 2012, kiun ni ne ŝuldis, kaj ni sukcesis apliki malpli altan aldonvaloran imposton al niaj rimedoj « loĝado » por la restadoj.

Ni notu krome, ke pluraj nmoveblaĵoj estas komplete amortizitaj en 2013, kio kaŭzos fortan malkreskon de niaj amortizoj ekde la venonta jaro, malgraŭ la ekstera ŝtuparo. La amortizo de la ekstera ŝtuparo por 2013 estas tre malalta ĉar tiu ĉi, amortizebla dum 20 jaroj, estis finita la 12an de decembro.

La agadraporto, la financa raporto kaj la buĝeto estos voĉdonitaj dum la jarkunveno, same kiel aprobo de la kontoj por la jaro 2013 kaj uzmaniero de la profito, kaj kvitigo de la Administra Komitato.

SINPREZENTOJ DE LA KANDIDATOJ AL ADMINISTRA KOMITATO

Jean-Luc KRISTOS

Mi esperantiĝis kiam dudekjara kaj trapasis sukcese «Ateston pri Kapableco» en Grezijono en 1971. Poste, mi partoprenis ĉirkaŭ 30 restadojn en la kastel' dum ĝia «Ora Periodo», el ili 3 «Printempajn Renkontojn» kun Eo-klubanoj el mezlernejo, kie mi instruis.

Depost 2005, mi gvidas kursojn kaj kantmomenton «Popkanzonoj» (en Grez., en Germanio, en Pluezek, en francaj kluboj...). Pasportan Servon mi uzas kutime.

Grezijono daŭre estu Ea klerigejo : jen mia deziro ; sed, pro la poioma malapero de staĝanoj, necesas malfermi la kastelon al aliaj projektoj : unuaj paŝoj al lingvoj, seminariejo diverstema, branĉkroĉad'... por financi la prizorgadon. Al tio rekte rilatas pluvivado de Grezijono. Mi do aliĝas al jam konata projekto pri malfermo trans Eo-mondo.

Jannick HUET

Mi estas kandidato por plu realigi la projekton «por la malfermo» de 2010.

Naskiĝinta en 1954, instruisto emerita, mi praktikas Esperanton ĉiutage kun mia germana edzo kaj miaj infanoj, granda parto de nia vivo ligiĝas al Eo, kaj en Francio, kaj alilande.

Mi elektiĝis komitatano en 2006. Ekde 2010, ni bone antaŭigis la projekton, sed restas ankoraŭ multo farenda, por malfermi la kastelon plie, precipe de lundo ĝis vendredo. Sciante ke niaj propraj rimedoj ne egalos la amplekson de financaj rimedoj necesaj longtempe por renovigi la kastelon kaj kromdomojn, nepras de nun peni serĉi partnerojn por daŭrigi la originan celon oferti kulturcentron al la esperantistoj kaj ambicii kontribui al la radiado de Esperanto je larĝa publiko.

Ĉar la instruado de Esperanto kaj la klerigo de instruantoj por mi tre gravas, mi iniciatis ekde 2011 intensivan staĝon, kunlabore kun ILEI kaj UEA, finiĝantan per ekzamena sesio; tiu staĝo kunigas ĉiujare tridekon da staĝanoj.

Mi zorgas ankaŭ pri la administrado de nia arbaro.

SAT-Amikaro

La asocio SAT-Amikaro (Unuiĝo de franclingvaj esperantistaj laboristoj) kandidatas por plu ĉeesti la komitaton kaj kiel kultura progresema asocio ĝi klopodos kongrue kun siaj statutoj apogi sin sur la riĉaĵo, kiun konsistigas la Kulturdomo por disvolvi ĝian kaj sian agadon, en intereso de la tuta esperantistaro, kaj precipe de la proleta, do kun interalie aparta zorgo, ke tarifoj de staĝoj ebligu partoprenon de kiel eble plej multaj interesatoj, eĉ tiuj pagrilate limigitaj.

Ĝi ankaŭ celas apogi projektojn, kiuj malfermas la bienon al homoj, esperantistoj kaj ne-, kiuj konsentas kun niaj valoroj pri klerigado kaj popola edukado.

Vito Markov reprezentos nian asocion.

Frédéric DAMBREVILLE

Naskiĝinta en 1971 sur la insulo Reunio, supera instruisto pri matematiko, doktoro kaj eksperto pri informtraktado, mi laboris en Monterey en Kalifornio, poste en la Pariza regiono. Ekde 2012 mi laboras por la defendministrejo en Bretonujo apud Rennes.

Mi lernis Esperanton en 1998 per interreto, poste en la E-klubo de Rennes, krome partoprenis du internaciajn renkontojn. Iuj konas min kiel kunorganizanto de gastronomia semajnfino, la «Kreola Semajnfino» de JEFO. Societano ekde 2010, mi partoprenis unu someran kaj du jarfinajn staĝojn kaj ankaŭ ok laborsemajnfinojn, ekzemple por la renovigo de la telerlavejo kaj dela tablostokejo post Zamenhof-salono (betonplanko).

Mi kandidatiĝas por subteni la projekton «por la malfermo» de 2010. Mi ja konsideras, ke tiu projekto respondas al duobla defio : flegi la heredaĵon, kiun reprezentas la kastelo Greziljono por la esperantista komunumo ; konservi la spiriton de malfermo kaj renkonto de la Kulturdomo.

Elisabeth BARBAY

Elisabeth Barbay (1953) Edukistino. Esperantiĝis en 1994. Ekkonis Grezilionon en 1996 okaze de infanstaĝo, kien mi venigis ses lernantojn. Nuntempe, mi ricevas pagon kiel animanto por gvidi E-atelerojn « Junaj Civitanoj sen Landlimoj » en tri baz-lernejoj.

Miaj proponoj por kontribui al vivigo de Grezijono :

- **Organizi ĉiujare la infan-semajnon FRINGOJ**, viv-ĉerpujo por la estonta esperantistaro kaj monstro-fenestro por E° kaj por la Kulturdomo dank'al la **fina spektaklo malfermata al ekstera publiko**.

- Per nekostaj rimedoj, **transformi la Zamenhof-salonon al taŭga plurcela ejo**, kun lumoj, sonsistemo, scenejo, tiel ke artistoj kaj asocioj (ne nepre esperantistaj) ekŝatos uzi ĝin. Luota kune kun servo de teknika responsulo, por spektakloj, film-spektadoj, prelegoj..., **tia ĉambro alportus al la kastelo parton de la mono necesa al ĝia prizorgado**.

Espéranto-France

Espéranto-France aktivighas en diversaj kampoj por disvatigi esperanton en Francio. Estas granda honoro kandidatighi por kunlabori kun Grésillon, kiu havas komunajn celojn al nia asocio. Espéranto-France jam estas membro de la komitato de Grésillon kaj ni tiel esperas fruktdoneman kunlaboron kadre de estontaj projektoj.

Isabelle NICOLAS

Mi naskiĝis en 1963, mi praktikas esperanton jam de dudek jaroj.

Por kreskigi EKD, mi volas daŭrigi la projekton de Claude Bensimon kaj proponi ankaŭ la eblecon gastigi artistojn kaj verkistojn en restadejo.

Por fari tion, ŝajnas al mi necese krei asocion, kiu estus ligo inter ambaŭ strukturoj. Tiel, ni povus peti ŝtatmonon kaj partopreni diversajn asociajn forumojn.

Malfermi la EKD al grupoj, disvolvi kunlaborojn estas maniero por konigi la EKD kaj esperanton al publiko, kiu ankoraŭ ne estas konscia.

La konferencoj estos tradukitaj esperanten.

Mi jam donis la ideon traduki musikkomedion « La Eta Arturo ». La traduko de la teatra parto estas finita, ni devas daŭrigi nun la kantojn.

Por esti en la reto, paĝaro estas nepra.

Mi ekkomencis mian projekton kun la organizado de studperiodo pri ekonomio kaj mi estas tie dum la EKD-staĝoj por lerni la funkciadon.

Tiuj, kiuj volas, povas legi la konvencion sur la Grezijona paĝaro.

Proponoj je cerbumado pri la evoluo de nia Civila Societo: evoluo al transformado en Anoniman Societon aŭ Simpligitan Akcian Societon aŭ al alia organizo kun kreado de kroma societo aŭ asocio.

Greziljono ne povas limiĝi al nur siaj Esperanto-staĝoj, kiuj ne ebligas pagi la konservadon de la kastelo. La elektoj de 2010 montris la deziron de la Jarkunveno malfermi la kastelon al eksteraj agadoj, kion j aplanis Henri Micard eĉ antaŭ la aĉeto de Greziljono, kaj kio jam okazis antaŭ jaroj. Eblas serĉi diverstipajn partnerojn aŭ momentajn konsumantojn de la lokoj:

- Esperantistojn aŭ Esperantistajn organizojn, kio estas nuntempe kvarono el niaj konsumantoj luprenantoj,
- stabilajn partnerojn kun celoj proksimaj al Esperanto, kiuj povu lupreni plurfoje la kastelon por staĝoj : Isabelle Nicolas ja laboregas por trovi tiajn partnerojn, sed tio ne estas facila afero.
- konsumantoj luprenantoj laŭokazaj, trovitaj per anoncoj, tio estas en la komenco la plimulto el niaj klientoj.

Ĉiukaze, la sola fakto, ke ni malfermiĝas al ne-membroj, do eksteruloj, estas leĝe ne akordigebla kun nia nuna statuso civila societo, ekde kiam tio ne estas nur escepta. Krome, tiu malfermo al ne-membroj devus temi pri nia ĉefa statuta celo: Esperanto. Laŭ nia advokato, por rajti malfermiĝi proponante servojn al ne-membroj de la societo, la Kulturdomo devas jure ĉu transiri de la statuso « civila societo » al la statuso « komerca societo », ĉu krei duan strukturon sub la formo de societo aŭ asocio, kiu prizorgus tiun ĉi aktivaĵojn (la kooperativo transdonus ilin) profite al ne-membroj de la Kulturdomo. Tio ĉi ne povos okazi ĉi-jare, sed la diskuto komenciĝos dum tiu ĉi Jarkunveno. La Kulturdomo tamen restos kooperativa societo kun funkciado kvazaŭ sama kiel la aktuala.

Se la elekto finfine farita estos ne krei duan strukturon, sed transformi la Kulturdomon, la situacio fariĝos tre kompleksa. Ĉar kaze de transformado en komercan societeton, la Kulturdomo ne rajtas fariĝi SARL (Societo kun limigita respondeco) ĉar ĝi havas pli ol 100 membrojn. Por fariĝi SAS (Simpligita Akcia Societo), necesas laŭ la nuna leĝo unuaniman konsenton de ĉiuj aktualaj membroj, sed la atendita leĝo pri Socia kaj Solidara Ekonomio eble malfirmigos tiun ĉi kondiĉon kaj ni povus montri al la societanoj la avantaĝon de tiu ĉi elekto kompare kun la statuso SA (Anonima Societo), kiu devigos nin interalie havi profesion revizoron, dum nia vendosumo estas malalta kaj la celo estas ekvilibrigi la kontojn kaj daŭre vivteni la Kulturdomon, kaj ne riĉigi personojn. La profesia revizoro estos do tre grava kosto. Alia malavantaĝo de la SA estas la peza administraĵaro kun multaj dokumentoj transdonendajn al la membroj, ĉar la funkciado de la SA estas antaŭvidita por komercaj societoj eble tre grandaj. Aliflanke, la funkciado restus proksima al la nuntempa, kun administra komitato rezultanta de la leĝo pri kooperativoj sed ne de la civila kodo, laŭ kiu ni devus havi unu respondecan administranton.

Se la deziro de la membroj de la Kulturdomo en pli posta tempo estas konservi pli flekseblan strukturon, ja necesas krei duan strukturon, kiu prizorgu ĉiujn « komercajn » agadojn kaj ĉiujn enspezigajn aranĝojn, kiuj ebligas al la Kulturdomo plenumi sian propran celon. Plia studado necesas por fiksi, kiuj transdonoj de agadoj estos utilaj, kiuj konvencioj estu subskribataj tiel, ke la Kulturdomo konservu la eblecon kontroli la tuton. Tiurilate, la asocia statuso estas tiu, kiu donas plej da fleksebleco, sed kvankam ĝi ebligas krei pagatajn rilatojn, la profito de la asocio ne povas esti disdonata inter la membroj, do ankaŭ ne profite al la Kulturdomo se ĝi fariĝus membro. Ankaŭ leviĝos la demando de la disponigo aŭ ludono de la ejoj. Asocio altiras malpli la atenton de la impostejo al la Kulturdomo ol societo.

Se la dua strukturo estas societo, en la nuna stato de la pristudo ne eblas antaŭvidi kooperativan societeton ĉar neniu aspektas rekte taŭga. Temus pri SAS, deviganta kunmeton de kapitalo, kiu povus esti variebla. Kontrolado fare de la Kulturdomo estus ebla. Tamen societo estas pli kosta ol asocio por funkcii.

Kaze de kreado de dua strukturo, la Kulturdomo estus membro de ĝi kaj sub kelkaj kondiĉoj, la dua strukturo povus esti membro de la Kulturdomo. La Kulturdomo ludonus al la strukturo, ekster siaj propraj staĝoj, okupajn tempojn kaj la strukturo, ekzemple, surpronus luadon al ekstera publiko, partneroj aŭ laŭokazaj luprenantoj. Se la strukturo estos asocio, eblos devigi, ke la plimulto de la Administrantoj de la Asocio estu laŭjure elektitaj de la Administrantoj de la Kulturdomo.

Societo aŭ asocio obeas malsamajn logikojn. été ou association répondent à des logiques différentes

Ni deziras, ke vi konsciu pri la neceso, la Komitato povus precizigi: pri la deviga neceso, evoluigi la Kulturdomon por ebligi kromajn enspezojn kaj atingi publikon, kiun oni pli facile povos tiam interesi al ESPERANTO. Ĉar la publiko malkovros niajn aktivaĵojn dum staĝoj aŭ aranĝoj sen rekta rilato kun nia unua celo. Ni retrovos tiumaniere ankaŭ la vojo al nia statuta celo, nome la instruado de Esperanto sed ankaŭ la liberigo intelekta kaj socia de siaj membroj kaj de partoprenantoj en siaj agadoj.

Ne eblas elekti dum la nuna jarkunveno, nek diri al vi, ke io estas elektita, sed informi vin pri la eblecoj, kiujn ni devos pli profunde studi, kaj interŝanĝi kun vi cele al plifajngo de la projekto de la Kulturdomo, projekto, kiu estu tiu de la membroj.

Ni petos de vi principan decidon por daŭrigi la pristudadon kun la novaj elementoj debatitaj dum la nuna jarkunsido. Ekde tio vi estos informitaj pri la evoluo de la pristudoj antaŭ la posta jarkunsido kaj la fina decido apartenos al la membroj kunvokataj kiel Eksterordinara Membrokunsido, principe venontjare.